

RECIMinfo

Bulteno de *Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo*, número 2, février 2005, 2 €

Ĉiuj ni estas civitanoj de la mondo

KONDIĈE KE ONI SCIIGU TION !

Paradokse ! Kiel oni povas aserti, ke evidentaĵo estas metita sub kondiĉo ? Ja ĉiu homo, kiu ajn estas ties vivloko sur tero, apartenas al la tutmonda komunumo ; ĝia vivo, ĝia aktiveco faras el ĝi regato kaj aktoro de historio. Regato, ĉar ĉiu homo heredas medion, kiu rezultas de historia evoluado de la naturo de homo kaj de socioj. Aktoro, ĉar ĝia agado partoprenigas ĝin en evoluado de nia mondo, kiun neniu povus haltigi en ĝia emo al unueco. Aktoro, ĉar ni ankoraŭ povas elekti la strukturon de tiu unueco. Ekzemple, se ni ne priatentas, la tutmonda homamaso fariĝos konsumanto submetita al la povo de mono en medio, kie la nocio pri servo malaperas profite al tiu de komerco. Oni facile divenas, ke tiu trudita komercigo povas nur produkti pli kaj pli da malriĉeco, da flankelasitaj, da marĝenigitaj socioj ĝis atingi realan riskon de ribeliĝo, de socia eksplodo kun tia monda amplekso, kiun neniu aŭdacas imagi. Kaj tamen tio evidentas, ĉiuj ni estas mondcivitanoj. Beleta frazo, kaj bela mortnaskita principo, kiu nenion ŝanĝas. Krom se ...

Konscii pri sia propra mondcivitaneco estas bone, sed ne sufiĉe. Al kio utilas por mi esti Civitano de la Mondo, se mi restas sola, senvoĉa, senfara, sen esprimo ? Jen baldaŭ 40 jaroj, kelkaj monde famaj civitanoj de la mondo donis al ni la mesaĝon, ke la savo povos veni nur de la popolo de la mondo, de la individuoj, kiuj konsistigas ĝin, de ĉiu el ni. Nu jes, ĉar ni konscias pri nia identeco, ni sciigu, ke ni estas civitanoj de iĝanta mondo per la voĉo kaj la agado de ĉiuj kaj de ĉiu ; ĉar se ni ne sciigos, ke ni estas civitanoj de la mondo, ni riskas fariĝi nenio alia ol aro da submetitoj priplorantaj batalon ne kondukitan por la ellaborado de pacema kaj civilizita mondo.

Daniel Durand

KONGRESO DE LA POPOLOJ

Tie ĉi ni revenas sur la tre grava plena kunveno de la Kongreso de la Popoloj, kiu okazis en Parizo la 25an, 26an kaj 27an de oktobro 2003. En RECIM-info n-ro 1 ni anoncis la kreadon de la Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj. Tie ĉi ni parolos pri la funkciado de Kongreso de la Popoloj.

Historio kaj celoj.

En 1963, la ĉefaj tutmondistaj organizaĵoj de la planedo kunvenis en Bruselo por fundamenti la bazojn de Kongreso de la Popoloj, konceptita kiel stadio al la kunvoko de Monda konstitucia asembleo. El tiu Brusela kunveno kreiĝis la "Komitato por la Kongreso de la Popoloj", kiu restis funkcia ĝis la Kongreso de la Popoloj fariĝos aŭtonoma, en 1977.

La misioj atribuitaj al la Kongreso de la Popoloj estas jenaj :

- Ø Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.
- Ø Proklami la neceson de publikaj tutmondaj institucioj kapablaj kontentigi tiujn bezonojn.
- Ø Difini :
 1. sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de publika tutmonda institucio ;
 2. kiuj transdonoj de kompetenteco profite al la publikaj tutmondaj institucioj, devos esti konsentitaj de la naci-ŝtatoj ;
 3. la procedurojn necesajn por la kreado de publikaj tutmondaj institucioj ;
 4. la strukturon de kreota tutmonda supernacia federacia aŭtoritato.
- Ø Esprimi per mondaj deklaroj la opinion aŭ volon de la tutmonda popolo pri la eventoj koncernantaj la sorton de la homaro.
- Ø Intervenĉe la registaroj aŭ la internaciaj instancoj pri la aktualaj mondproblemoj.
- Ø Pristudi la raportojn de fakuloj pri la projektoj de tutmonda institucio kaj esprimi sian opinion.
- Ø Prezenti antaŭprojekton de tutmonda federacia konstitucio al la naciaj registaroj kaj parlamentoj, kaj al la diversaj internaciaj instancoj.
- Ø Ĉiel iniciati utile al la ekfunkciigo de demokrata monda parlamento, konsistanta i.a. el Ĉambro de la tutmonda popolo.
- Ø Celi la kunlaboradon kaj la kreadon de edukaj, informaj kaj kulturaj organismoj, favorantaj al ekkonsciigo pri universala solidareco.

La situacio

La komitato por la Kongreso de la Popoloj organizis la balotelektojn de 1969, 1971, 1973, 1975 kaj 1987.

Enhavo

Kondiĉe, ke oni sciigu tion !.....	p. 1
Kongreso de la Popoloj : la reformo.....	p.1 k 2
ASKOP : sukceso de la kunveno en Mulhuzo	
• Somera Universitato de Tutmondismo	p. 3
• Sporto por paco.....	p. 4
• Medio (CILAME)	p. 4
• Koalicio por Tutmonda parlamento.....	p. 5
• Administrado kaj vivo de ASKOP	p. 6
Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.....	p. 7
Internacia Urĝa Agado	p. 7
Registrcentroj kaj Korespondantoj	p. 8

Poste la Kongreso de la Popoloj sin mem regis kaj organizis la balotelektojn de 1980, 1984, 1987, 1994 kaj 1998. Ĉiu balotelekto koncernis voĉdonantaron de ĉirkaŭ 10.000 homojn. Sume 100.000 voĉdonantoj estis koncentritaj per tiuj 10 balotelektoj, kiuj donis mandaton al 20 Elektitaj Delegitoj kaj 20 Anstataŭaj Delegitoj. La Reglamento de Kongreso de la Popoloj antaŭvidis relative malsimplan sistemon por anstataŭeco okaze de forpaso aŭ de nedisponebleco de Elektitaj Delegitoj.

Krome estis antaŭvidite, ke la voĉdonantaro pilargiĝos balotelekton post balotelekto, kaj sendube pro troa optimismo de la konceptintoj, ne estis antaŭvidita tempolimo de mandato, tiom oni estis persvadita, en 1963, rapide atingi sojlon ebligantan la kunvokadon de Monda konstitucia asembleo. La historio malpravigis la optimismojn ; kaj ĉar la anstataŭeca sistemo atingis la finon de siaj kapabloj, necesis reformi la reglamenton de Kongreso de la Popoloj.

La ŝanĝoj

De nun la Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj estas kun konstanta nombro (Eble tio estos 39)

Ili estos elektitaj por mandato de 9 jaroj, kaj rebalotelektitaj trione ĉiun trian jaron.

La unua balotelekto por tiu Kongreso de la Popoloj "nova tipo" okazos en 2007.

La voĉdonantaro konsistos por ĉiu balotelekto el triono de la enskribitaj voĉdonantoj, alimaniere dirite : la registritaj civitanoj de la mondo.

La kuranta procezo

La Reglamento de la Kongreso de la Popoloj estas reviziata. La nova teksto estos submetita al la aprobo de la Kongreso de la Popoloj dum plena kunveno proponita por la 4a de marto 2006. Tiu kunveno de la Kongreso de la Popoloj devos ankaŭ nomumi Komisionon por la Kontrolo de la Balotelekto.

La bulteno **RECIM-info** ludos ĉefan rolon de tiuj balotelektoj :

- Ø RECIM-info n-ro 2 (kiun vi havas en mano) : informado pri la nova elekta organizado ;
- Ø RECIM-info n-ro 4 (februaro 2006) : alvoko al kandidatiĝoj.
- Ø RECIM-info n-ro 5 (aŭgusto 2006) : listo de la deklaritaj kandidatiĝoj ; daŭrigo de la alvoko al kandidatiĝoj.
- Ø RECIM-info n-ro 6 (februaro 2007) lanĉo de la balotelektoj.

Novajoj pri la lernejo de Kavumu (Kongio)

8an de decembro 2004. Pri la Infaneta kaj Baza Lernejo de Kavumu, antaŭ du tagoj la lernejo ricevis helpon el 40 ferladoj, venantaj de GTZ-PNKB ; tiuj ferladoj kovros la tegmenton de klasĉambro de 5mx8m ; kaj per malgrandaj kontribuoj de la lernantaj gepatroj de IBLK oni aĉetis stangojn kaj tabulojn por almenaŭ konstrui du klasĉambrojn. En unua tempo la lernejo estos konstruita el simplaj materialoj (tabuloj kun tegmento el galvanizitaj ferladoj) ĉar la lernejo troviĝas en urĝa situacio. Necesas, ke la infanoj trovu ŝirmejon. Nun la infanoj, kiuj lernas en IBLK, sekvas siajn kursojn en luprenitaj konstruaĵoj, kio tre kostas al IBLK.

Jam unu NRO el Hindio ĵus reagis post lego de la informo pri IBLK en la unua numero de RECIM-info ; temas pri la NRO IMC-Trust regata de St Paul Arora, kiu deziras kunlabori kun la asocio "Monda Solidareco - Kune Agadi" kaj baldaŭ interveni por la problemo de IBLK.

Aimé Ruzuba Bisimwa

? Infaneta kaj Baza Lernejo en Kavumu, Sud-Kivuto, R.D. Kongio aŭ BP 470, CYANGUGU, Ruando.

La Registrocentroj, kiuj eldonas apartan bultenon estos alvokitaj transdoni tiujn informojn al siaj legantoj.

Ankaŭ notinde, ke teamo nun laboras por instali paralelan sistemon por voĉdoni per Interreto.

La dato kaj la loko de la balotnombrado ne estas ankoraŭ fiksitaj.

La kandidatiĝoj

La periodo por kandidatiĝi estos malfermita en marto 2006, post la nomumo de la Elektro-Kontrolkomisiono. La kandidatiĝaj kondiĉoj estos precizigitaj en dokumento, kiu estos tiam eldonita. Notinde, ke klerigado estos proponita al la kandidatoj en la kadro de la Somera Universitato de Tutmondismo en Ĉaŭdefono (Svisio), en julio 2006.

? **Kongreso de la Popoloj**, ĉe Jean-Marc ZAN, 4bis avenue Gallieni, 91800 BRUNOY (France). jmz1@free.fr

Se vi deziras ricevi vian Mondcivitanan legitimkarton, sendu la ĉi-suban formulon plenigitan kaj subskribitan kun la monsumo : 15 € (8 € okaze de malfacilaĵo) al la adreso indikita sur la reverso.

"Konscia pri miaj respondecoj kaj decidinte akiri la rekonon de miaj rajtoj kiel membro de la tutmonda komunumo, mi petas, plu gardante mian ĵtatanecon, esti registrita kiel mondĉivitano".

NOMO (per majuskulaj presliteroj) FRAŬLINA NOMO

PERSONAJ NOMOJ..... Profesio.....

Naskiĝdato Naskiĝloko

Loĝeja adreso.....

Poŝta adreso (kesto).....

Poŝta kodo URBO, Lando :

En..... la

(subskribo)

◆ Laŭeble sendu vian **foton por legitimilo**

◆ Indiku la **lingvon** de via legitimkarto :
angla, araba, **Esperanto**, franca, germana,
greka, hispana, itala, japana, nederlanda,
portugala, sveda.

KONSULTA ASEMBLEO ĉe LA KONGRESO DE LA POPOLOJ ASKOP

1an, 2an kaj 3an de oktobro 2004



Elzaco, gastlando.

Grandan gratulon kaj dankegon al Roger Winterhalter kaj al la tuta teamo da animantoj de la Domo de la Mondcivitaneco.

Tiu plurĉela spaco kun 80 m² finfine montriĝis iom malvasta por akcepti 55 homojn krom la Pakistanaj amikoj kaj iliaj tipaj manĝaĵoj. Sed tio estis tre simpatia. Tiuj, kiuj alvenis la unuaj iris de surprizo al surprizo vidante enriri Landing, kies permeso por restadi en Francio estis havigita nur lastminute, Yaovi el Togolando, la Ĝenerala Sekretario de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, Dorin el Timisoara (Rumanio) pri kiu oni malmulte havis informojn de dek jaroj, Gupta, la eksa urbestro de Lucknow (Hindio), kiu atingis Mulhuzon laŭ itineraro tra Vieno (Aŭstrio) kaj Lille (Francio), Rob kaj Germà, kiuj venis de Novjorko, sed ankaŭ multaj aliaj venintaj de pli malpli ĉie en Francio, Germanio, Belgio, Svisio. Entute, 17 ŝtatanecoj estis reprezentitaj. Eĉ se tiu miksaĵo da ŝtatanecoj ne estis la volita celo, tamen eliĝas el tiu inter-nacia amaso el agantoj por justico, paco kaj progreso, en iom malvasta ĉambro, esperiga etoso, kiu restos longtempe en ĉies menso.

Prezentinte la teamon, la celojn, la laboron kaj la rezultatojn de la Domo de Mondcivitaneco, Roger transdonis la senkulpiĝojn de multaj homoj senmovigitaj

Refarenda sukceso !

La renkonto de Mulhuzo estis la unua tia. 12 tutmondistaj organizaĵoj estis reprezentitaj de 55 homoj el pli ol 10 landoj. ASKOP estas samtempe kunlabora kontrakto inter tutmondistaj organizaĵoj, spaco por renkonto, interŝanĝo kaj dialogo inter homoj, kaj laboratorio de ideoj, iniciatoj kaj eksperimentoj, kies konkludoj estos utilaj al la Kongreso de la Popoloj.

Tiu unua ASKOP-renkonto okazis en Mulhuzo. La estonta povos okazi ĉie ajn en la planedo, ĉar ĉie estas civitanoj de la mondo kaj tutmondistaj organizaĵoj pretaj por adopti tiun tipon de kunlaborado, interŝanĝo, dialogo, iniciatemo por ke de ĉie sur la tero oni progresu al la tutmonda demokratio.

Averte al ĉiuj legantoj de RECIM-info (el 120 landoj) ! Petu de ni la organizajn kondiĉojn.

pro sano, aŭ kiu ne havis la ŝancon de Landing, Yaovi aŭ Gupta, kaj li prezentis la celojn de la renkonto : interkonatiĝi aŭ rekonatiĝi, akordiĝi por kunlabori pri certa nombro da celoj, interŝanĝi niajn ideojn kaj praktike konkretigi ilin.

Poste ni ekiris por ekesplori la lokon de la renkontiĝo kaj gastigo : la Junulara gastejo de Mulhuzo, kie ni trovis dormejon, manĝaĵojn kaj vastan kunvenĉambron. Sabate, post kelkaj enkondukaj paroloj de kelkaj animantoj, ni eklaboris matenon en fakkunvenoj, kaj ceteran tempon en plena kunsido. Jen la rezultatoj :



Somera Universitato de Tutmondismo

Somera Universitato de Tutmondismo.

La agado de Kongreso de la Popoloj kaj de ĝiaj satelitaj organizaĵoj bezonas, por daŭrigi, pri animantoj kaj engaĝintaj homoj sufiĉe kompetentaj. Kompententeco neniam estas denaska : ĝi akiriĝas kaj transdoniĝas. Tial estas decidite krei spacon por interŝanĝoj kaj klerigado pri tutmondismo. La prospektota publiko estos la kandidatoj kaj la elektitoj al la Kongreso de la Popoloj, la respondekantoj de la mond-civitana registrado, la animantoj de la asocioj membroj de ASKOP, kaj ĉiuj dezirantoj : studentoj, feriantoj aŭ emeritoj.

La studoj konsistos el du partoj :

- fundamenta parto, kies preparo estas donita al komisiono de la Registrolibro de la Mondcivitanoj ;
- monografia (tema) parto, kiun preparos la Kultura

Centro de Esperanto (KCE) de Ĉaŭdefono.

La instruado povos okazi en pluraj lingvoj, kaj almenaŭ en franca, angla kaj Esperanto.

Laŭ propono de KCE de Ĉaŭdefono (Svisio) unua sesio estos organizita de la 24a ĝis la 29a de julio 2006. La akcepta kapablo estas de 80 homoj, kun relative diversaj tranokteblecoj inter hotelo kaj kampadejo.

Jam de nun oni povas rezervi tiun semajnon !

Tiu Somera Universitato de Tutmondismo ne konkurencas la Instituton por Tutmondismaj Studoj, sed kompletigas ĝin : la celataj publikoj, la temoj kaj la celoj estas nete malsamaj.

? Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CP 311, CH 2301 LA CHAUX DE FONDS, Svisio




Sporto por paco

« *Fronte al mondo en kiu oni friponas, en kiu oni sin stimulas per EPO, kokaino... oni povus imagi kaj demonstri, ke nun ekzistas inoj, viroj, junuloj kaj adoltoj, kiuj sin stimulas per frateco, solidareco, pacemo.* »

Tiu temo estis inspirita de la agadoj de Georges Krassovsky kaj Yves Angeloz. Neniu el ili povis ĉeesti en Mulhuzo. Tamen fakkunveno laboris pri la temo. Multaj ideoj estis diritaj, sed la laboro devas daŭri por atingi konkretigon. Ni mallonge prezentu la inspirintojn :

- Georges Krassovsky estas civitano de la mondo, senpatruja, mezeŭrope devena. Dum sia tuta vivo li agadis sur pluraj frontoj, kiuj koncernas la respekton de la vivo : ekologio, malarmado, civitaneco. Por porti siajn ideojn tra tuta Eŭropo, li ekrajdis sur sia biciklo kaj veturis milojn da kilometroj irante de urbo al urbo, de urbodomo al urbodomo, de grupoj da amikoj al grupoj da amikoj.

- Yves Angeloz estas la organizanto de la



Mondaj Sportludoj de Paco. Kinezoterapiisto kaj humanisto, li konsideras, ke la korpa aktiveco partoprenas en la konstruado kaj en la pleniĝo de individuo same kiel de socioj. De la komenciĝo de la 80aj jaroj li engaĝiĝis en grandegajn aventurojn, kiuj jam movis dekmilojn da partoprenantoj el ĉiuj landoj : la Mondaj Sportuloj por Paco jam okazis 12 foje. Unuigi homojn sub la ŝildo de sporto, de kulturo kaj de humaneco. Krei amikecajn ligojn inter partoprenantoj kaj per tio favorigi la interkompreniĝon, la toleremon inter homoj kaj popoloj por servi la morgaŭan pacon.

Lastminute Yves devis rezigni sian vojaĝon al Mulhuzo, tial la laborkunveno nur esploris kelkajn ideojn, sed ne faris tujajn decidojn. Tio estas nur prokrastita al la estonta renkonto.

Provizora adreso pri tio :

? Roger Winterhalter, MCM-ARSO, 20 rue Paul Schutzenberger, FR 68200 Mulhouse.

CILAME

Kunordiga Internacia Komisiono por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio *KIK TAM*



Kreita en 1991 **CILAME** celas la progreson de la defendo de la planeda medio per uzo de strategio taŭga al la diversaj ekologiaj, politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj situacioj en la perspektivo de tutmonda aŭtoritato pri medio. La 11an de marto 1989 en Hago, la ŝtatestroj de Nederlando, Norvegio kaj Francio lanĉis alvokon inspiritan de la tezoj de la civitanoj de la mondo kaj de la Mondfederaciistoj, por ke estu kreita monda organizaĵo pri medio. 43 landoj en la mondo subskribis tiun alvokon.

Bilanco de CILAME, post 13 agadjaroj :

- Ø Grava kontribuo en la konsciigo de la publika opinio kaj de la sciencaj kaj registaraj medioj pri la neceseco de tutmonda aŭtoritato pri medio (**TAM**) ĉefe en Francio. Tiu konsciigo havis kiel subtenilojn : "verdan" dosieron, flugfoliojn, la organizadon de tri grandaj kolokvoj, inter kiuj tiu, kiu konkludis la laborojn de la komisiono Coppens pri la franca ĉarto pri medio.
- Ø La kunlaboro de CILAME kun mediprotektaj asocioj restis parta, malgraŭ interesaj kunvenoj.
- Ø **TAM** estis nur skizita ; dum Rusio decidis

subskribi la alvokon de Hago, Usono, Ĉinio kaj Britio plu restas konsciigitaj kaj konvinkotaj per mobilizado de la scienculoj, prospektivuloj, naciaj asocioj, religiaj komunumoj, kaj per ekspluatado, por transformi ilin, de la malgrandaj kaj grandaj ekologiaj ruiniĝoj okazintaj aŭ okazontaj.

Ŝajnas, ke la ĝusteco de la celoj de CILAME praviĝas ; tamen ĝiaj agadrimedoj pri strategio kaj taktiko estas kompletigitaj kaj redifinitaj ; tial la graveco de rezolucio komuna inter CILAME kaj ASKOP. (Ni ĝin publikigos en estonta numero).

La planeda pluvivo kaj la transdono de kvalito de vivo al la estontaj generacioj estas ĉefaj fronte al la mediaj ruiniĝoj kaj al la troa konsumado de la naturaj riĉofontoj pro la rapidigo de la monda ekonomia kresko esprimita per la "Kruza Landa Produkto".

? CILAME,

- ◆ 53 avenue du Lignon, CH 1219 GENEVE (Svisio) (oficiala sidejo)
- ◆ 142 avenue de Versailles, 75016 PARIS (Francio) (sekretariejo)

Konforme al tiu kunlaboro inter CILAME kaj la aliaj asocioj membroj de ASKOP, Registrolibro de la Mondcivitanoj proponis al CILAME informajn paĝojn en estonta bulteno RECIM-info.

Naciismo ne estas plej alta koncepto. Plej alta koncepto estas la tutmonda komunumo. Gandhi



Agadi por paco

La faka laborkunveno unue parolis pri la influo de la amasinformiloj sur la disvolviĝo de la perforto. Ĝi rememorigis, ke ĉiu havas la respondecon krei pacon kaj per sia vivmaniero kaj per siaj memdevontiĝoj. Ĝi sugestis aliĝi al la kampanjo por deklari neleĝa ĉiun militon. "Nur paco estas leĝa" ; postuli kreadon de pacministerioj en ĉiu registaro laŭ la formulo : "se vi deziras pacon, preparu pacon". Unu el la manieroj prepari la pacon estas la adopto de reformoj pri la problemoj, kiuj povas transformiĝi en militkaŭzon : la kontentigo de la vivbezonoj, la nuligo de la maljustaj ŝuldoj, la reformo de la financaj institucioj. Fine la fakkunveno proponis du tipojn da iniciatoj : la "Samtempa Politiko" kaj la kreado de Pacdomoj por la lernejoj (posta numero de RECIM-info povos elvolvi tiujn proponojn).



KOALICIO POR TUTMONDA PARLAMENTO KAJ MONDA DEMOKRATIO



En la komenco, la "Alianco por respondecanta, plureca kaj solidara mondo" organizis la Mondan Asembleon de la Civitanoj en Lille (Francio) en 2001. Poste, ekde oktobro 2002 elektronika forumo animita de Germà Pelayo, Arnaud Blin kaj Rob Wheeler estis lanĉita. Temis pri elektronika trilingva listo (franca, angla kaj hispana) dediĉita al la projekto de tutmonda parlamento. Pli ol 300 homoj interŝanĝis multajn retmesaĝojn ofte ege interesaj.

Okaze de la Monda Sociala Forumo de Bombajo (Hindio), aktivaj membroj de tiu listo renkontiĝis kaj kreis Koalicion por tutmonda parlamento kaj monda demokratio. De tiam tiu koalicio aranĝis du samtempajn laborkunvenojn en junio 2004, unu apud Bonn (Germanio), la alia en Sanfrancisko (Usono) kie Registrolibro de la Mondcivitanoj estis reprezentita.

La celoj de la Civitanoj de la mondo kaj tiuj de la Koalicio estas proksimaj. La komuna deziro estas kunlabori kaj unuigi fortojn kaj ideojn.

La tri ĉefaj iniciatoj rekomenditaj de la Koalicio estas

jenaj :

- Ø **La unua projekto estas popola referendumo**, demandanta al la balotantoj ĉu ili subtenas la ideon krei mondan parlamenton. Tiuj kiuj jese respondas, estos petataj registriĝi mondcivitanoj kaj fariĝi membroj de la Koalicio. La Civitanoj de la Mondo estus instigitaj partopreni en la interretaj diskutoj.
- Ø **La dua projekto entenas la aranĝadon de komunikaj kaj decidaj iloj** per Interreto kaj ankaŭ virtualan bibliotekon da informoj, libroj, artikoloj kaj aliaj materialoj.
- Ø **La tria projekto estas aranĝi forumon por monda demokratio**, kiu okazus principe ĉiun jaron. Ĝia celo estus arigi ĉiujn personojn kaj organizaĵojn plej interesiĝantajn kaj plej engaĝiĝintajn en la klopodoj por krei tutmondan parlamenton kaj mondan demokration. Unu el la unuaj celoj de la forumo estus interkonsenti pri la valoroj kaj principoj, sur kiuj tutmonda parlamento kaj monda demokratio baziĝus.



Kompreneble RECIM-info informos la Mondcivitanojn pri ĉiuj realaj progresoj koncernantaj tiun specifan kunlaboradon inter la Koalicio kaj la tuta aro de la organizaĵoj membroj de ASKOP.

Du adresoj por tiu temo :

- ◆ Didier Couernelle, 18 rue Jules Delhaize, BE 1080 BRUXELLES, Belgio (franca kaj angla)
- ◆ Rob Wheeler, 1927 Hafer Road, FAYETTEVILLE, PA 17222, Usono (angla)

Administrado de ASKOP

ASKOP estas regata de du apartaj organoj : la Estraro kaj la Transnacia Gvidkomitato. La tuto konsistigas ian administran konsilantaron.

En Mulhuzo, balotelektoj okazis por dividi la taskojn. Jen la rezultato :

- Ĝenerala Sekretariino : Marie Martin-Pécheux ;
- Adjunkta Ĝenerala Sekretario : Mickaël Trotot
- Kasisto : Daniel Durand
- Ĉefkunordiganto de la Transnacia Gvidkomitato : Josep Ortega. Adjunktaj kunordigantoj : Marie-France Condé-Rey, Michaël Ehinger, Ali Miloud, Dorin Hehn, Christiane Libouban.

La konsiloj de Josep Ortega por interreta komunikado :

"Kiel vi scias tion, unu el la celoj de la Transnacia Gvidkomitato estas la kreado de centro de informado, diskutado, kunlaborado, kunordigado kaj eble decido per Interreto. Mi jam kreis "wiki"-paĝon por ASKOP, vizitinda je : <http://ascop.editme.com>. "wiki"-paĝo estas ttt-ejo en kiu ĉiu povas partopreni, aldonante aŭ ŝanĝante la enhavon dum oni vizitas ĝin. Tre grave estus, ke vi konatiĝu kun la "wiki"koncepto kaj la eldonmetodoj. Vi povas provi enmeti iom da informoj en la provpaĝon "sandbox", al kiu vi povas aliri ekde la paĝo de la ASKOP-regantaro en <http://ascop.editme.com/sandbox>. Por atingi la eldonpaĝon, klaku sur la opcion "Edit", kiun vi trovos dekstre. Tio malfermas eldonfenestron, kiu ebligas al vi aldoni enhavon en la paĝon.

Vi trovos ankaŭ diversecon da "malfermitaj fontoj", t.e. interaktivaj fontoj, en kiuj ĉiu povas libere kontribui, kaj kiuj povas esti metitaj en ĉiun ttt-ejon. Nun ni havas enciklopedion, ĵurnalon, diskutforumejon, liston da elektronika retposto, datumbankon por citaĵoj, kaj pli grave la liston de la membroj, al kiuj vi povas aldoni vian nomon.

Fine, por pli bone koni unu la alian kaj plifaciligi la komunikadon inter ni, mi sugestas la utiligadon de Skype, sistemo Voĉo-lp, kiu ebligas senpage telefoni inter interret-utiligantoj de Skype, aŭ por tre malalta prezo per normala telefono. Vi povas viziti la hejmpaĝojn de Skype en diversaj lingvoj : <http://web.skype.com>

Josep L. Ortega
jlortega@andorra.ad

La subskribintoj - membroj de l'ASKOP :

- ♦ **Burkinio** : Cercle d'Assistance et de Formation d'Emploi et de Stages - CAFES
- ♦ **Kongio R.D.** : Association des Volontaires pour l'Autopromotion Rurale - AVOLAR
- ♦ **Francio** : Alliance Rhin Supérieur Oberrhein - ARSO - Maison de la Citoyenneté Mondiale - MCM ; Association pour la Promotion de la Solidarité ; Franca Mondcivitana Registrocentro ; Eŭrop Demokratio Esperanto ; La Grande Relève ; Mouvement Citerrien ;
- ♦ **Senegalia** : Centre d'Enregistrement des Citoyens du monde ; Fédération des Associations Sérères
- ♦ **Svisio** : WeltbürgerInnen ;
- ♦ **Usono** : Global Peoples Assembly ;
- ♦ **Transnacio** : Coalition for a World Parliament ; Conseil International de Liaison pour une Autorité Mondiale de l'Environnement - CILAME ; Esperanta Civito ; Registrolibro de la Mondcivitanoj RECIM ; Monda Solidareco Kontraŭ la Malsato - MSM. - Union Internationale des Journalistes Africains, section Afrique du Nord - UIJA.

ÆARTO DE ASKOP

Ni, membroj de la Konsulta Asembleo æ la Kongreso de la Popoloj, opinias ke la agnosko pri la digno rilata al ĉiuj membroj de la homa familio kaj pri iliaj rajtoj egalaj kaj neforigeblaj konsistigas la fundamenton de libero, justo kaj paco en la mondo.

Ni konstatas

- Ø oftan opozicion inter la naciŝtataj interesoj kaj la interesoj de la monda popolo, same kiel la mankon de ĉia transnacia aŭtoritato demokratie elektita por gardi ĝiajn interesojn ;
- Ø ke malsato, mizero kaj milito ne estas fatalaĵo, sed la sekvoj de la politika organizo de la planedo ;
- Ø la neceson konstrui sociojn demokratiajn. justajn, partoprenajn, daŭrajn kaj pacajn ;
- Ø ke la mondaj problemoj postulas globajn solvojn kiuj respektas la diversecon de la homa familio ;
- Ø ke la homoj endanĝerigas la riĉaĵojn de nia planedo per intensiva ekspluato de la grundo, de la subgrundo kaj de la maroj ;
- Ø ke la individuoj kaj la grupoj agas plej ofte en maniero egoisma, ne zorgante pro la aliaj, precipe kiam ili estas foraj.

Ni volas

- Ø partopreni en la kreo de demokratia monda parlamento. el kiu unu la modeloj estas la Kongreso de la Popoloj ;
- Ø promocii la pacon, la rifuzon pri diskriminacioj, la egalecon antaŭ la leĝo kaj la spiriton de solidareco ;
- Ø krei spacon par reflektado kaj interŝanĝoj malfermitan al ĉiuj, kaj kontribui al la konstruado de solidareca mondo, kunigante la iniciatojn de tie kaj aliloke ;
- Ø riĉiĝi per niaj diversecoj por trovi niajn similecojn, kupli niajn reflektadojn al eksperimentado kaj agado konkreta sur la tereno ;
- Ø gardi la riĉaĵojn kaj la biodiversecon de nia planedo por la nuna kaj estontaj generacioj ;
- Ø ke ĉiu individuo kaj grupo estu responsaj pri la bonfarto de la aliaj kaj la harmonia evoluo de la planedo.

Ni alvokas ĉiun organismon kaj ĉiun individuan kies idealoj estas mond-civitismaj kaj demokratiaj aliŝi al la Konsulta Asembleo æ la Kongreso de la Popoloj por kunkonstrui alian mondon, pli bonan, unuiĝintan. plurkulturan kaj pacan, subskrihante ĉi tiun Æarton.

En Mulhuzo, la 3^{an} de oktobro 2004.



MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO

Ø Ŝanĝo de nomo.

Tio estas nun oficiala. *Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato* ŝanĝis sian nomon por nun nomiĝi pli simple : **MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO** (MSM). Tiu ŝanĝo estis decidita la 7an de aŭgusto 2004 dum kunveno de la Monda Federacia Asembleo, kiu okazis en Vagaduguo. Oni povas tie vidi eksterordinan eventon laŭsignife. Fakte unuafoje tiel grava decido pri organizaĵo de Kongreso de Popoloj estas farita sur la Afrika kontinento. Necesas diri, ke la membroj de MSM estas afrikanoj je 65 % !

MSM estas asocio laŭ mutualista solidareco, kies intervenkapablo venas de la kotizoj de la 1300 membroj, kaj nur de tiuj kotizoj. la transnacia solidareco estas tre konkreta maniero travivi sian mondan civitanekon. La asocio MSM asocio ĉeestas en 33 landoj, ĉefe en afrikaj kaj eŭropaj landoj, sed ankaŭ, denove, en mezamerikaj landoj : Gvatemalo kaj Meksikio, de kie ĵus alvenis centoj da aliĝoj.

Ø La nunaj projektoj : Guemnati (Burkinio).

Guemnati estas la nomo de grupo da Pulaj virinoj en la vilaĝo Gonse, je 25 km de Vagaduguo, la ĉefurbo de

Burkinio, sur la vojo Vagaduguo-Kupela). Tiuj virinoj estas dommastrinoj. Devenantaj de nomadaj familioj la Puloj de la grupo Guemnati instaligis en la ĉirkaŭaj savanoj de Gonse. Tradicie ili vivas el la profitoj de bestbredado kaj de lasta tempo el la agrokultivaj profitoj. Ili projektas aranĝi ĉirkaŭbaritajn kortojn apud la familiaj loĝejoj, por tie bredi po 5 ĝis 10 ŝafinojn. Tiu breda koncepto estas tute noviga rilate al la paŝtaj kutimoj kaj devus partopreni en la lukto kontraŭ la dezertigo. Kosto de la projekto : 2 450 000 CFA F (3 735 Eŭroj)

CPA-Cifunzi (Kongio)

Cifunzi estas vilaĝeto de la tutmondiĝinta komunumo Kalonge. Tra Cifunzi pasas rivero, en kiu la tutmondistaj animantoj aranĝis malgrandan baraĵon por funkciigi elektroturbinon kapablan prilumi la vilaĝon kaj funkciigi kelkajn motorojn en metiejoj. Alvale de la baraĵa elfluojo instaligis fiŝa-koka kooperativo, kiu nun fosas du laĝetojn kaj aranĝas kokejon kaj kuniklejon. Tiuj aranĝoj rezultas el solidareca kontrakto kun MSM por monsumo de 4 200 USD el la necesaj 6 200 USD.

? MSM

- BP 12 283, LOME (Togo)
- ruelle Haute, 21120 GEMEAUX (France)
- www.globidar.org



INTERNACIA URĜA AGADO

Cunamo

26an de decembro 2004 : sismoj kaj cunamo en suda Azio.

Internacia Urĝa Agado estas organizaĵo fondita de kelkaj civitanoj de la mondo, el kiuj kelkaj Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj. En 1979 IUA/AUI ricevis la konsenton de Kongreso de la Popoloj, kiel skizo de monda organizaĵo por la prevento de katastrofoj kaj la kunordigado de helpoj.

La 29an de decembro 2004, teamo da 7 volontuloj de IUA kun 14 kofroj da materialo ekflugas al Kolombo. Plurfaka nia teamo kapablas interveni sur pluraj frontoj : savo-malobstrukcado, loĝistiko, resanigado, medicina kaj psikologia subteno, rekonstruado. Loka kontaktulo de Internacia Civila Servo (ICS) atendas nin tuj je la elirejo de la aviadilo por plifaciligi la administrajn klopodojn, kaj nin konduki ĝis la loko de renkonto kun la lokaj ne-registaraj organizaĵoj.

ICS kaj MONLAR (agrikultura disvolviĝo) agadas sur la tuta teritorio kaj ilia kolekto da informoj montriĝos altvalora por direkti nian terenan agadon. Post interkonsento, ni decidis interveni en Periya-Kallar (10 km sude de Batticaloa, ĉe la orienta marbordo), vilaĝo el fiŝkaptistoj forlasita de la registaro (tamula teritorio) kaj de la NRO.

Ni dediĉis nian tempon al laboro en hospitalo. Restis nur la muroj. Interne de tiu konstruaĵo, oni trovis en ĉiuj ĉambroj koton kaj la meblojn : tabloj, seĝoj kaj aparatoj en senorda amaso. Do la laboro konsistis en purigado por ke la kuracistoj kaj flegistoj povu denove labori. Tiu malfacila kaj peniga laboro estis farita ĝis la 11a de januaro kun multe da homoj. Ni estas 7, kaj kunlaboris 50 aliaj homoj el la vilaĝo kaj asocioj.

La 22an de januaro, dua teamo ekflugis al Srilanko.

Konsistanta el 4 homoj spertaj pri rekonstruado kaj aranĝo de projektoj, ĝi ricevis la mision rekonstrui plurajn domojn en la subkvartaloj de Beruwalla. Poste ĝi denove iros en la intervenan areon de la unua teamo por taksado de la lokaj bezonoj, kiu utilos por aranĝi alian rekonstruprojekton kaj por prepari postan programon de klerigado pri la prevento de la naturaj riskoj.

Lay propraj kaj interretaj informoj de AUI/IUA

- ? A.U.I. (Action d'Urgence Internationale),
- Terrasses Montcalm, 1401 rue Fontcouverte, FR 34070 MONTPELLIER, Francio
 - www.aui-ong.org

REGISTROCENTROJ KAJ KORESPONDANTOJ DE REGISTROLIBRO

Depost la publikigo de RECIM-info n-ro 1 (aŭguste 2004) la Mondcivitana Registrolibro subskribis aŭ renovigis konvenciojn por la statuso de Korespondanto de Registrolibro kun :

◆ **Alĝerio**

Khemisti BECHAIRIA, BP 1529 DZ 41000 SOUK AHRAS
Rabah BENDALI Akabiou TIMEZRIT DZ 06751 BEJAIA

◆ **Andoro :**

Joseph Lluís ORTEGA MATAS, Av.Rocafort, 2 SANT JULIA DE LORIA

◆ **Argentino :**

Nevenka CALVO KUCHAN , Colon 1184 - 5° 13 AR 7600 MAL DEL PLATA

◆ **Belgio :**

Fernand R. THIBAUT, rue des Roses, 23 BE 6001 MARCINELLE

◆ **Benino :**

Anicet Laurenta QUENUM , 07 BP 114 Sainte Rita COTONOU

◆ **Kroatio :**

Mato ŠPEKULJAK , Oštarijska 8 HR 10000 ZAGREB. Vidu ankaŭ la paĝojn kaj la bultenon en kroata lingvo :

<http://free-zg.t-com.hr/cdm-hr/>

◆ **Irlando :**

Florence LOCHRIN-CUSSON (precizigota adreso)

◆ **Peruo :**

Yen CAMPOS CUADRO, Peru Humano URB. LADERAS DEL NORTE 0-7 CHIMBOTE

◆ **Pakistano :**

Imran Yousuf MUHAMMAD, F-13/32, Block 5 CLIFTON KARACHI

◆ **Rumanio :**

Dorin HEHN, Str A. Saguna, A4, Ap.4 RO 1900 TIMISOARA

Aliaj kontaktoj estas kurantaj por reprezentado de Registrolibro de la Mondcivitanoj en Afganistano, Hindio, Nepalo, Srilanko, Niĝerio, Maroko kaj Hispanio.

◆ **Germanio**

Inge GRZYB, korespondantino de Registrolibro jam de multaj jaroj en Magdeburg nun ricevas helpon de Gerard Hirschmann (Esperantisto), kiu jam prelegis dum la Internacia Festivalo, kaj kiu kreis kelkajn paĝojn en germana kaj en angla sur Interreto : <http://www.geocities.com/weltbuergermagdeburg>

La tago de la Mondcivitanoj (20an de marto) okazigos "civitanan" rekonton kun dancoj kaj kantoj en amika etoso punktita per mesaĝoj kaj diversaj prezentoj.

? Inge GRZYB, Fröbelstrasse 6, DE 39110 MAGDEBURG.

La kompleta listo de Registrocentroj kaj Korespondantoj estas havebla el Interreto je la paĝo : <http://www.recim.org/cdm/adres.htm>. La elektronikaj adresoj estas haveblaj lau retroŝta peto al info@recim.org.

E-Forumejo

La civitana forumejo de la Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj estas malfermita al ĉiuj mond-civitanoj, ĉu enregistritaj ĉu ne. :

<http://ascop.editme.com>

Bonvolemuloj serĉatas !

Necesas tradukistoj en ĵuajn lingvojn, pedagogoj, interretuloj, afilfarantoj, artistoj, organizantoj de prelegoj kaj kunvenoj, vojaĝantoj, verkistoj, arkivistoj, ktp...

Ĉu vi havas tian kompetentecon ?
Neniul hezitu eĉ unu sekundon, ekriatu kun ni !

info@recim.org

ALVOKO POR KONTRIBUOJ

La Registrolibro de la Mondcivitanoj kontentus se ĉiu Civitano de la Mondo **jare** pagus monsumon egalan al **salajra duontago**. Komprenable pri tiu "bonvola mondimpoto" ĉiu mem taksas kiom li povas pagi, konsiderante siajn monrimedojn kaj la monsumojn, kiujn li krome jam pagas por la defendo de la tutmonda komunumo.

Enregistriĝo, abono, memvolaj kontribuajtoj - aĉetoj

Pagmanieroj :

•Aŭ per ĝiro al la UEA-konto : civi-p.

•Aŭ al CITOYENS DU MONDE
C C P P A R I S 2 8 4 8 9 4 Y
IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02
Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR

•Ni akceptas la eŭrajn ĉekojn sur francaj bankoj.

•Por la aliaj landoj, preferendas la internacia poŝtmandato, aŭ la interbanka ĝiro inkluzivante la ĉi supran IBAN-kodon

•Ni akceptas la bankajn **monbiletojn** (konverteblajn aŭ ne) enŝovitajn en koloran aŭ karbonan parperon, sub koverto ne registrita.

RECIM-info

Imprimé par nos soins

Le numéro : **2 €** (envoi compris)

Abonnement pour 5 numéros : **10 €**

Tirage : 4000 exemplaires

Comité de rédaction : Daniel Durand,
Claudine Fischer, Liliane Metz Krencker.
Directeur de la Publication : Daniel Durand

REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ

asocia sidejo :

66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

Sekretariejo, (librotrenado kaj bulteno ...) :

"Les Nids", **FR 49190 ST-AUBIN** (Francio)

www.recim.org